



Mireille Grosjean (naskita Mireille Robert), franclingva svisino, naskiĝis en 1946 en La Chaux-de-Fonds (Svislando) en tre malfermita familio, kie kunvenis homoj el la tuta mondo. Ŝi studis la francan, la germanan, geografion kaj historion en la universitato de Neuchâtel. En la jaro 1968 ŝi ekloĝis en la germanparola parto de Svislando kaj tie instruis la francan. En 1977 ŝi revenis al Romandio kaj komenciĝis por ŝi instruado de la germana, organizado de klasinterŝanĝoj kaj interkultura edukado. Ŝi mem oftege faris tiajn interŝanĝojn kun siaj gelernantoj, lertigis geinstruistojn pri tiuj spertoj same kiel lernejedirektorojn. Ŝi verkis pri tiu temo libron, kiu estas ilaro por fakuloj.

En 1982 ŝi komencis praktiki aikidon. Pro tio ŝi flugis al Japanio en 1985. Tie ŝi spertis mankohavan komunikadon per la angla. Reveninte al Svislando ŝi vidis ekspozicion pri Esperanto kaj tuj eklernis la internacian lingvon.

Tuj ŝi havis en la svisa movado respondecujojn, tio estas prezidanteco de Kultura Centro Esperantista kaj Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds. Tio daŭris de 1988 ĝis 1994. En 1998 ŝi fariĝis komitatano A por Svislando en la Komitato de UEA, tiu ofico daŭris ĝis 2013, poste ŝi reprezentis tie la Ligon ILEI. Ŝi partoprenis multajn UK-ojn kaj reĝisoris kaj prezentis plurfoje la Internacian Artan Vesperon tie. Ŝi reprezentas UEA-n ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Mireille membris en la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI, UEA de 2006 ĝis 2022. Ŝi estas prezidanto de Svisa Esperanto Societo, ŝi estas membro de Svisa ILEI Sekcio kaj komitatano ĉe ILEI. En 2013 ŝi fariĝis prezidanto de ILEI kaj reelektiĝis en 2015 kaj en 2018 en tiu ofico. En 2020 ŝi anoncis, ke ŝi ne kandidatiĝos por nova mandato en 2021.

Kunlabore kun la prezidanto de UMEA (medicinistoj) ŝi lanĉis la programon « aikideo » por prezenti Esperanton al aikidistoj kaj prezenti aikidon al esperantistoj. Vidu www.esperanto-aiki.de.

En la Jaro 2006 Mirejo vidviniĝis; en la jaro 2008 ŝi emeritiĝis. Ŝi estas senbrutara nomado kaj vojaĝas tra la tuta mondo, ĉefe al Azio kaj Afriko. Ŝiaj multnombraj spertoj pri instruado ĝenerale kaj

instruado de fremdaj lingvoj, same kiel ŝiaj grandaj konoj pri interkultura edukado kaj konfliktoŝolvado estas granda pluso por nia movado.

En 2014 Mirejo estis elektita la la ESPERANTISTO DE LA JARO 2014.

En 2015 kaj en 2018 Mirejo estis reelektita kiel ILEI-prezidanto.

En 2016 ŝi ricevis la Premion Deguĉi.

En 2019 ŝi estis elektita Honora Membro de Svisa Esperanto-Societo.

En la 21-a de septembro 2015 (la 21-a de septembro estas la tutmonda Tago de Paco) edukado.net publikigis kursmaterialon de Mireille kun la titolo "KONFLIKTOSOLVADO".

En 2022 (novembre) ŝi estis elektita Honora Membro de ILEI. Ŝi sukcese trapasis la KER-ekzamenon en nivelo C2.

Vidu en www.eo.wikipedia.org